



DUMONATA KULTURA INFORMILO KAJ ESPRIMILO

Redaktejo : Esperanto, F 47470 BEAUVILLE

Abono en Eŭropo, 1992 : 60 FF. Ekstereŭrope : 80 FF

Ĝiri al : CERCLE AMICAL ESPERANTISTE DE L'AGENAIS
Pŝk : 3371 74 M Bordeaux (mencii same sur bankĉekoj!)

trafe instrui...

Por trafe instrui, la unua demando estas : kion la gelernantoj volas atingi ? Kion ili kapablu fine de la kurso ?

Ĉu kompreni kiel funkcias Esperanto kaj kapabli traduki tekston en sian propran lingvon ? (Tion oni celas ekzemple lernante la latinan aŭ la grekan lingvojn.) Tiukaze certe plej adekvatas gramatika metodo, kiu ebligas akiri plej rapide pasivan, intelektan konon de la lingvo.

Tamen, krom tiuj, kiuj lernas lingvojn kiel teoriajn stud-objektojn, mi supozas, ke la granda plimulto lernas esperanton por uzi ĝin kiel vivantan lingvon : ili deziras kompreni ĝin, sin esprimi en ĝi skribe kaj parole : ili deziras akiri ilon por **komuniki** kun alilingvanoj.

Nu, se komuniki estas la celo de granda parto de E^o-lernantoj, necesas ekzameni en tiu ĉi lumo niajn instru-kutimojn. Ĉu ili helpas la konstruon de komunik-kompetenteco ?

Ĉu la lernolibroj prezentas, aŭ povas prezenti, veran lingvo-uzon ?

Se ni celas helpi al la lernantoj akiri la kapablon komuniki, ni prezentu al ili, kaj en kursoj kaj en libroj, ne apudmetitajn frazojn, kiuj vakue funkciigas gramatikajn strukturojn, sed lingvajn ekzemplojn de vera komunikado. Tio estas minimuma postulo. Kaj tiu postulo ne validas nur post la fino de la unuagrada kurso, post la akiro de la bazaj lingvaj elementoj : ĝi validas ekde la unua leciono kaj ĉiam. La akiro de la gramatiko, de la vort-farado, de la strukturoj ja povas okazi en rilato kun vera lingvo-uzo.

Pli precize, tio signifas, ke ĉiam estu difinita, klara, preciza komunik-situacio : ke oni kapablu kompreni : kie okazas la interparolado, kiu parolas kaj al kiu, kaj ĉefe kial ili interparolas (kio estas iliaj motivoj). Nur se oni povas respondi tiujn tri demandojn, temas pri vera lingvo-uzo (interparolado, letero,...) Alikaze, temas pri frazoj, kies nura celo estas instrui sed kiujn fakte oni ne povus difini kiel lingvon en la senco de komunikilo.

Sed ĉu eblas, ekde la komenco, kiam la lernantoj ankoraŭ neniom scias, krei veran situacion ?

Jena ekzemplo, eltirita el "**Ĉu vi parolas Esperante?**" (unua leciono) montros, ke jes :

- Bonan tagon.
- Bonan tagon.
- Mi estas Karlo Lasota.
- Pardonu, kiu vi estas ?
- Mi estas Karlo Lasota.
- Karlo Lasota ? Tre agrable. Mi estas Eŭgeno Guzek.
- Tre agrable.

En tiu ĉi interparolado, la situacio estas klara : 2 personoj interkonatiĝas. Tial iliaj vortoj havas celon kaj oni komprenas kial ili parolas :

- por saluti (Bonan tagon)
- por sin prezenti (Mi estas Karlo Lasota)
- por ripetigi la alian (Pardonu, kiu vi estas ?)
- por diri ion afablan kaj krei bonan ekritaton aŭ por respondi socian konvencion. (Tre agrable).

La gramatikaj nocioj renkontitaj estas relative multaj kaj (oni povus pensi) malfacilaj : akuzativo (Bonan tagon),

(daŭrigo sur p.35)

ĈIES VOĈO

PRI SKLAVECO

Laŭmode estas kulpigi la Eŭropanojn pri ĉiuj malbonoj en la mondo. Okaze de la 500a datreveno de la albordiĝo de Kristoforo Kolumbo ĉe la nova Mondo, oni konstatas emon reliefigi unu el la plej hontindaj agadoj de la Eŭropanoj : la sklavokomercon.

Respondeciĝi nur la loĝantojn de la malnova kontinento pri tiu hontinda agado perfortas la historian verecon. Nome, la Eŭropanoj praktikis la sklavkomercon nur ekde la 16a jarcento ĝis pli-malpli la jaro 1850. Jam en 1814, Britio klopodis ĉesigi tiun fi-praktikon. Tiu trafiko daŭris proksimume tricent dudek jarojn kaj oni povas taksu la nombron de la sklavigitoj dum tiu periodo je 12 milionoj ().*

Necesas aldoni ke la blankuloj ne devis mem kapti la viktimojn, ĉar la Afrikanaj potenculoj vendis la homojn al la Eŭropaj ŝipestroj. La ŝipoj forlasis Eŭropon, ŝarĝitaj per senvvaloraj bagatelaĵoj, alkoholaĵoj kaj armiloj por pagi la aĉetotajn sklavojn. Mi ne detale devas priskribi la agadon de la Eŭropaj negristoj kiuj praktikis la t.n. "triangulan komercadon". Tiu nigra punkto de nia historio estas la temo de multaj verkoj. La televida felietono "The Roots" (Radikoj) ne malmulte kontribuis al la famiĝo de tiu hontinda kaj kruela komerco.

Se ni komparas tiujn faktojn kun la araba sklavigo, oni tamen povas aserti, sen troigi, ke niaj praavoj respondecas nur pri malgranda parto de la sklavokomerco.

*Sklaveco ekzistis en Norda Afriko ekde nememor-eblaj tempoj (**). Oni jam trovas egiptan tekston el 1500 a.K., kiu traktas sklavojn devenantajn de la PUNT-lando (la nuna Somalio) kaj la lastaj estis liberigitaj nur en 1970 en la Omana sultanlando.*

Malmultaj okcidentaj historiistoj studis la islam sklavigon, verŝajne ĉar ili timis ke la Araboj kaj Afrikanoj taksos tian esploron kiel provon forgesigi la rolon de la Eŭropanoj kaj Usonanoj en la sklavigo. Ankaŭ en la tuta Afriko oni konstatas emon flanken peli tiujn sklavigistajn agadojn.

Mahometo neniam intencis forigi sklavecon. Male, la korana leĝo agnoskis kaj organizis la sklavecon. Tio permesis, ekde la 7a jarcento, disvolviĝegon de de la sklavokomercado.

La vojaĝkondiĉoj de la kaptitaj malfeliĉuloj estis teruraj kaj la mortonivelo dum la traŭro de Saharo estis altega. La bezono havi eŭnukojn kaŭzis kastradon kiu okazis en kondiĉoj tiom malsanigaj kaj sep-saj, ke apenaŭ dek procentoj de kastritoj supervivis la operacion. (La kastrado estis specialaĵo de la koptaj pastroj).

Pro manko de dokumentoj ne estas eble kalkuli la nombron da viktimoj kiuj spertis la araban sklavigon. Tamen, mia opinio, ĝi certe situas inter kvindek kaj cent milionoj, rezulte de tia praktiko dum la multaj jarcentoj. Historiisto Sir Reginald Coupland asertas: "Kvankam la jara rendimento de la araba komercado neniam atingis la nivelon de la plej grandaj eŭropaj jaraj kvantoj, la sumo de la eksportitaj Afrikanoj, dum la jarcentoj, fare de la Araboj, estas sendube mirindege granda."

La vivkondiĉoj de la sklavoj en la islamaj landoj estis pli decaj kaj malpli teruraj ol en la amerikaj kolonioj. Nome, la korana leĝo devigis la proprietulojn humane prizorgi siajn sklavojn kaj admonis la kultantojn liberigi servutulon por ricevi pardonon por ĉiuj siaj pekoj. Plejparte la sklavoj devis labori en la familia rondo kiel servistoj. Multaj sklavinoj fariĝis kromedzinoj de la mastro. Pro tio la virinoj estis pli multe kostaj ol la viroj. La eŭnukoj atingis la plej altajn prezojn kaj ofte ĝuis plenan fidon de la mastro kaj plenumis administrajn taskojn. (Rimarku ke la katolika eklezio senhonte uzis kastritajn kantistojn, eĉ en la ĥoro de la papa kapelo, kvankam ĝi malpermesis la kastradon de junaj knaboj). (***)

Neniam la arabaj landoj intencis ĉesigi mem la sklavecon. La abolicia movado naskiĝis en Britio. La instiganto estis Willian Wilberforce. Pro la premo de sia publika opinio, la Britia registaro luktis en ĉiuj arabaj landoj por abolicio, helpate de la aliaj eŭropaj landoj. Tiuj lastaj volis starigi en Afriko profitodonajn koloniojn kaj tiucele bezonis laboristojn. Oni do konstatas ke, kvankam la Eŭropanoj agnoskis precipe humanajn motivojn, ilia agado havis ekonomiajn, politikajn kaj komercajn kialojn.

Homo estas vulpo por homo. Ne gravas, ĉu li estas Eŭropano aŭ Afrikano. Konklude mi citas Sofoklon: "La homo trovis nenion pli malbonan ol monon; ĝi konfuzas la koron de la honestaj homoj kaj instigas ilin al krimoj."

H. CASTIAU

(*) *La traite des nègres* - Isabelle Aguet - Eld. Minerva.

(**) *L'esclavage dans le monde arabe* - Murray Gordon - Eld. Robert Laffont.

(***) Enciklopedio Alpha.

DU TRAGIKAJ DATREVENOJ

1492 - reĝa dekreto pri ekzilo de judoj el Hispanio.
1942 - nazia konferenco pri genocido.

Kun miksitaj sentoj - depende de nacia aparteno kaj mondkoncepto - rememoras ĉi-jare la homaro pri la malkovro de Ameriko antaŭ 500 jaroj. Tiu ĉi datreveno markas ankaŭ por la juda popolo tragikan eventon de ĝia historio, kiun superis poste multoble la Holokaŭsto okazinta antaŭ 50 jaroj.

En la sama ibera duoninsulo, de kies bordoj eknavigis la ŝipoj de Kolumbo, ekregis la plej ekstremisma bigotismo de la katolika eklezio, kiu kulminis per enkarcerigoj, torturoj de alireligiuloj, aŭtodaŭtoj, perforta kristanigo kaj amasa forpelo de "nekredantoj" fare de la Inkvizicio. Multaj judoj povis savi sin de kruela sorto ŝajnigante konvertiĝon al kristanismo (dum ili kaŝe flegadis la ritojn de siaj prauloj) sed eĉ pli multaj preferis sur-

preni la amaran sorton de formigrado el lando al kiu ili estis ligitaj per fadenoj de amo, kaj al kies kulturo ili estis tiom multe kontribuintaj. Tiuj judoj alportis baldaŭ prosperon kaj kulturan evoluon al la novaj gastigantaj landoj, sed la hispandevenan idiomon "ladino" ili gardis dum jarcentoj kiel gepatran lingvon.

Tiuj obskuraj okazintaĵoj el la malhela mezepoko tamen paliĝas kompare al la eĉ pli terura Holokaŭsto okazigita de la germanaj nazioj kaj ties alinaciaj lakeoj. Antaŭ 50 jaroj, en Wansee, antaŭurbo de Berlin, kunvenis naziaj ĉefuloj por fiksi la metodojn celantajn ekstermi la judan "rason" en Germanujo kaj la okupitaj landoj. La kaŝnomo elektita por la satana projekto estis "la fina solvo" (Endlösung).

Kiam Hitler akiris la potencon, en Germanujo vivis proksimume duona miliono da judoj. La granda plimulto estis plene asimilita ; ili senrezerve identiĝis kun la germana kulturo, alprenis la kutimojn, morojn, pensmanieron de la kristanaj germanoj. Ilia kontribuo al la germana kulturo, sciencoj, arto, financoj, estis de ne-taksebla valoro. Impona galerio de brilmensaj, pleje alt-nivelaj "germanoj de Mosea religio" (kiel ili preferis difini sin) riĉigis Germanion dum pluraj generacioj. Inter 40 Nobel-premiitaj germanoj (ĝis 1933) viciĝis ne malpli ol 11 judoj (27%, dum ili konsistigis apenaŭ 1% de la loĝantaro).

La "dankesprimo" ne forestis. La ŝovinistoj, kies influo pli kaj pli fortiĝis, ne povis paciĝi kun la faktoj refutantaj la pseŭdosciencan teorion pri la kvazaŭa superereco de la "arja raso", unuavice de la "purrasaj" germanoj, kaj arogis al si la rajton decidi super sorto de aliaj popoloj, de sklavigo ĝis plena ekstermo. Por akiri la subtenon de la popolamasoj, flataĉante ili klopodis kredigi, ke ili apartenas al la elito de la homaro ("superhomoj, sinjora popolo"). Se la faktoj ne kongruas kun la teorio - ve al la faktoj... Tiucele ili lanĉis senbridan incit-kampanjon, kies esenco estis abomenaj kalumnioj kontraŭ la juda popolo. Frontispice de la fifama incit-gazeto "Der Stürmer" konstante legeblis la slogano : "la judoj estas nia malfeliĉo". Per tiaj kaj similaj manovroj akompanataj de harhirtige impertinentaj mensogoj, sukcesis la giganta propagand-aparato direktita

de la diable genia Jozef Goebbels enpenetriĝi en la homajn mensojn la venenajn mibrobojn de la rasismo kaj antisemitismo, ebenigante tieie la vojon al la "fina solvo". Ses milionoj da eŭropaj judoj pereis en tiu kolosa amas-ekstermo, senprecedenca en la homa historio.

Diference de la hispana Inkvizicio, la Tria Regno mortkondamnis ĉiun judon pro la nura fakto, ke li naskiĝis de judaj gepatroj. Baptiĝo al kristanismo neniom helpis ; la nazioj ne favoris la religion fonditan de Jesuc, kiu naskiĝis, vivis kaj mortis estante judo.

Kun la frakaso de la naziismo la rasa malamo ne ĉesis ekzisti ; eĉ niatage ĝi ŝetas ie kaj tie sian sinistran ombron. Ekstrema dekstrularo denove levas sian hidran kapon en Germanujo, Aŭstrio, Francio, eksa Sovetio kaj aliloke. Ĉi-foje objektoj de agresa ĉikanado kaj incitado estas ne ĝuste judoj, sed afrikanoj, turkoj, ciganoj k.a., sed la celo estas la sama.

La scbramensaj, honestaj kaj humane pensantaj homoj tutmonde levu sian protestan voĉon kaj senkompromise kontraŭbatalu la sepkapan monstron de la rasismo, por ke eventoj de antaŭ 500 kaj 50 jaroj neniam povu ripetiĝi. Per unuigintaj fortoj ni forbalau la ĝermojn de la rasisma pesto! Ni forlavu desur la frunto de la homaro la hontmakulon de diversspecaj antaŭjuĝoj, ŝovinismo kaj maltoleremo, por eviti novan katastrofon.

Teddy Löwenkopf

Pri "CI"

En L198 K-do Lutermano kontraŭbatalas la uzadon de "ci" per 7 argumentoj. Ni reprenu ilin unu post la alia.

1. La ciumado estas ne nur franca sed apartenas al lingvoj germana, hispana, itala, ktp. Nur la angla diras "vi" al ĉiuj krom Dio.
2. Tiun argumenton mi ne bone komprenas.
3. Mi konstatas, ke en francaj tradukoj de anglalingvaj libroj oni ofte uzas la pronomon "tu", kvankam en la originalo estas "you". Kial ne same en esperantaj tradukoj? Tiel ni markus la nuancon de intimeco.
4. K-do Lutermano preferas aliajn rimedojn por esprimi

intimecon aŭ senĝenecon. Sed kiujn rimedojn nome?

5. Mi konfesas ke povas esti embaraso pri la taŭga momento por pasi de "vi" al "ci".

Mi malfermas la Fundamentan Krestomation en la lasta parto poezia. Mi trovas poemon verkitan de Feliks Zamenhof, "Versaĵo sen fino" :

Lin vidis en ĝardeno.
Ekplaĉis li al ŝi.
Ŝi nomis sin Heleno,
Anton' sin nomis li.

Ekamis la konato
Kaj reciproke ŝi ;
Post paso de monato
Ŝanĝiĝis "Vi" per "ci".

6. Mi konsentas, ke aprobo de LANTI ne estas absolute rigardebla kiel senkondiĉa direktilo. Sed por mi ĝi estas ĉiam altvalora.

7. Siblanta "ci", afero de persona gusto. Ĉu vortoj kiel "cidonio", "ciklameno", "Cigano", "cigno", "cipreso", "cirkulero", "cimbalo"... estas malbelsonaj?

VALO

ĈU NI REZIGNU PRI ESPERANTO?

(vd. L:100, p.14)

La artikolo de BORVO en Laŭte n-ro 100 ne devas resti sen respondo.

Eble li tre bone kapablas la anglan kaj jam spertis, ke li povas paroli kun ĉiuj "neanglosaksoj" en la mondo sed ne estas komprenota en Anglio mem. Lia akcento estas akceptata per pardonemaj ridetoj tre ĝentilaj.

Ĉu li jam demandis al d-ro John C. WELLS kion oni povas pensi pri la "kripligita" angla lingvo tiom disvastiĝinta tra la mondo? Ĉu angloj kaj usonanoj estos tiom akceptemaj? Ĉu ili ne preferos trudi sian slangon al ĉiuj aliaj?

Esperanto estas malaperanta! Kial do vi lernis ĝin?

Vi pravas! La idealistoj estrantaj la movadon ĉiam rifuzis helpon de viaj tro interesataj "sponsoroj" pro la nepridubeblaj intencoj de komerco kaj profito. Sed se esperanto

ne entenas monan spiriton, vi ne povas diri la samon pri la usonangla.

Vi scias tre bone ankaŭ kian kulturon vehiklas tiu lingvo de komercistoj, ŝtelistoj kaj banditoj. Esperanto estas nur ilo, kaj kiel ĉiu ilo oni povas uzi ĝin bone kaj malbone, kiel martelo povas esti uzata por konstrui domon aŭ murdi la bopatrinon. Dependas de la uzanto.

Eble por vi ne gravas la spirito vehiklata de esperanto. Homaro estas vorto limiĝanta je la limoj de viaj konataj landoj.

Vi scias kiel malfacile estas lerni fremdan lingvon, eĉ esperanton. Vi scias ankaŭ, ke unu nura lingvo ne sufiĉas por kontakti ĉiujn sur la vasta tero. Kial vi decidis, ke la usonanglan oni devas trudi al sud-amerikanoj parolantaj hispane kaj portugale kaj siajn indianajn dialektojn? Ĉu ili ne estas pli multnombraj ol viaj hindoj kaj afrikanoj?

Vi ne kuraĝas fronti la ŝafojn de Panurgo plonĝantaj en la maron. Ĉu vi tre bone kapablas naĝi? Kial vi volas, ke ni fariĝu disvolvantoj de tiu lingvo? Ni male devas kontraŭstari kaj bojkoti. Ĉu vi jam nombras la multajn nulojn de la ĉeko, kiun vi ricevos de la internaciaj firmaoj interesataj, kiuj certe dankos vin tiele?

Se vi ankoraŭ kredas je tiu "fina malapero", ne malkuraĝigu la junulojn dezirontajn konversacii kaj korespondi kun aliaj neparolantaj la anglan. Se vi ne plu kuraĝas fronti la malfacilaĵojn de la vivo, kaŝu vin en iu angulo de dezerto kaj kiel ermito parolu nur al nuboj kaj ne plu skribu frazojn malhonorajn.

Modesto

Mi demandas min, ĉu la aŭtoro atente legis aŭ legas la seriozajn, nedubindajn verkojn koncerne la anglan lingvon fare de famaj, spertaj anglalingvanoj, kaj de profesoroj pri angla lingvo el diversaj mondpartoj. Lia propono pri anglalingvaĉo estas frenezaĵo... Li kompleze klarigas la pereon de esperanto. Eble li tion eĉ deziras...

Ĉu ĉi tiuj aŭtoroj ne scias aŭ ignoras la specifon de esperanto (neŭtralecon favorantan nenium ajn landon) aŭ ĉu ili estas konsciaj fuŝuloj?...

Suzanne



Plu pri "Ĉu ni rezignu pri esperanto?"

La ideo de Borvo pri anstataŭigo Esperanton per simpligita angla lingvo estas, feliĉe, tute utopia. Kaj ne nur kaŭze de tio, ke esperantistoj neniam rezignos pri la lingvo de Zamenhof, pri heredaĵo de centjara E-kulturo. La angla lingvo (normala, ne simpligita) ne povas esti vera mondlingvo, ĉar ĝi estas malfacile lernebla, malproksima de multaj neeŭropaj lingvoj, neneŭtrala, ligita kun troa ekspansio de certa kultur-ideologia tipo. La angla lingvo klipligita-simpligita "laŭ kelkaj principoj de Esperanto", kiel Borvo proponas, malsukcesos kaŭze de la samaj kialoj, pro kiuj ne venkis Basic English (ĝi, interalie, havis sponsorojn), Inglish (International English), kvar projektoj sub nomo World English kaj iuj aliaj similaĵoj. Pri ĝi oni povas trovi informon en informlibro pri interlingvistiko.

Koncerne vortojn de Borvo pri "fina malapero de Esperanto", nu, al mi ŝajnas, ke eblas pri tio diri per famaj vortoj de Mark Twain: "Onidiroj pri mia morto estas troigitaj". Eĉ se estas vero, ke "Esperanto emas malprogresi en pagipovaj landoj", krom tiuj landoj en la mondo, se mi ne eraras, ekzistas ankoraŭ landoj, ĉu? Ekzemple, ĉe ni, en Ruslando, malgraŭ nunaj plagoj kaj antaŭribela stato de la lando, nombro da esperantistoj tamen kreskas, malrapide sed certe. Kaj ĝenerale, ĉu povas iam Esperanto malaperi? Ĝi ne malaperis ja en periodoj multe pli pezaj por ĝi, ol nuntempo.

Tre dubinda estas ankaŭ la tezo, ke la E-movadon estas idealistoj. Ĉu la movadon ĝenerale iuj estras, povas estri, komandi, mastri, direkti, gvidi ktp.? Ankoraŭ ne, dank'al Dio.

Diru ni sincere: kio estas kialo de la nunaj sukcesoj de la angla lingvo? Unuavica (aŭ ununura?) kialo estas la nuna monda rolo de la anglalingvaj landoj. Sed ĉu tiu rolo estos ludata de ĝi post, ekzemple, 20 aŭ 50 jaroj? Futurologoj prognozadas, ke ne. Ili antaŭdiras, aparte, ke la dua duono de la XXI-a aŭ XXII-a jarcento estos "erao de Azio". Ĉu novaj mondgvadantaj landoj konsentos pri daŭrigo de la imperiismo de la angla lingvo? Ne, kaj la angla perdis post ia batalo sian nunan gvidan rolon, same kiel perdis similan rolon en Eŭropo la lingvo franca en sia tempo.

Mi riskas simili al iu paradoksemulo, sed mi komparas Esperanton kun komputora "viruso". "Viruso" neniel eviĝas en sistemo. Sed se ekestas certaj kondicoj, la viruso tuj eklaboregas kaj jen jam plenaj komputoraj retoj ne nur efektivas virusajn komandojn, ĝi viruson mem alportas en novajn kaj novajn komputorajn sistemojn. Same Esperanto: Tuj kiam aperos favoraj al ĝi kondicoj, nia lingvo tuj konektos sian riĉegan potencialon, sperton metodikan kaj alian necesan por mondskala disvastigo. Jes, tio okazos ne morgaŭ, kaj verŝajne ne dum nia vivo. Sed se Borvo volas kontribui al la afero de mondlingvo, li okupiĝu pri afero kiel eble malpli utopia - do, tute ne pri "new English world language", "Anational World Organization" ktp.

Igorj (Ruslando)

FACILA TASKO...

estos rebati la artikolon de Borvo, kiu kantas la laŭdojn de la angla lingvo. Li ne kaŝas ke, inter Esperanto kaj la usonangla, li elektis la duan kiel internacian lingvon. Kvankam multaj esperantistoj, pli kleraj ol mi, jam elĉerpis la argumentaron favoran al Esperanto, mi ne estas kapabla mastri mian miron antaŭ artikolo ja verkita de Esperantisto kaj mi deziras atentigi la legantojn pri kelkaj punktoj, kiuj ŝajnas al mi speciale gravaj.

Ĉiuj akordiĝas por agnoski ke internacia lingvo devas esti tute neŭtrala. Tia estas Esperanto, tiaj ne estas la angla, nek aliaj naciaj lingvoj. Ĉiuj flagoj de grandaj ŝtatoj, kies lingvon oni povus uzi kiel internacian komunikilon, estas makulitaj per la sango de la viktimoj de ilia imperiismo.

Kiun usonanglan ni devus lerni? Ĉu la lingvon uzitan de la piloto, kiu ĵetis la unuan atombombon? Ĉu tiun de la generaloj kiuj militis en la Golfo? Ĉu tiun de la usonaj buĉistoj kiuj mortigis milionojn da Indianoj? Mi ne volas aserti ke nur la anglalingvanoj plenumis tiajn krimojn, ĉar fakte kaj bedaŭrinde ĉiuj nacioj kulpas pri tiaj fiagadoj.

Ne, dankon, sinjoro Borvo! Mi preferas Esperanton kun ĝiaj homaranismaj idealoj, ĝia amika reto de samideanoj, ĝia vere internacia kulturo. Ni, Esperantistoj, ne bezonas

kaŝi nian pasintecon, ni povas fiera levi nian verdan flagon : ĝi estas pura. Kaj nia lingvo estas liga streketo kiu povas unuigi la tutan homaron.

Borvo memorigas nin pri la lingva politiko de Aleksandro la Granda. Ĉu li ne vidas la diferencon inter lingvo perforte trudita de imperiestro al malvenkitoj kaj lingvo kiu devas esti libere akceptata de la tuta homaro? Ĉu li kredas ke ekzemple la Kebekanoj aŭ Hindoj estos emaj akcepti la anglan kiel internacian lingvon?

La usonangla solvo plie ne estas demokrata. Nome, okaze de politikaj internaciaj renkontiĝoj, ĝi estigas du kategoriojn de partoprenantoj : unue, privilegiuloj, kiuj estas denaskaj anglalingvanoj kaj pro tio multe pli facile esprimas sin ol la dua kategorio, kiu lernis la lingvon kaj plimalpli fuŝe parolas ĝin. Dum oni eĉ ne povas rekoni la naciecon de la partoprenantoj dum esperantistaj kongresoj. Zamenhof jam rimarkigis tion kaj estas malesperige konstatiti ke oni devas senĉese ripetadi tiom evidentajn principojn, eĉ al kelkaj esperantistoj.

Mi kompatas Borvon, kiu ne komprenis ke Esperanto ne estas nur komunikilo. Ĝi estas ankaŭ fonto de intelekta ĝuo ; ĝi ne nur ebligas mezklerajn homojn sperti intelektan vivon, malproksime de arogantaj eminentuloj, sed ĝi estigas ĝin. Nia bona lingvo estas malsama al ia ajn nacia lingvo, ĉar ĝi instigas siajn adeptojn al krea aktiveco. Ĉu Borvo kuraĝus publikigi artikolojn en angla revuo, estrata de fakaj ĵurnalistoj?

Lastan argumenton mi volas prezenti. Estas devigo por ĉiu nacio gardi sian heredan proprietaĵon. Popolo, kiu perdas sian propran kulturon, samtempe perdas sian animon. La angla lingvo, invadanta la mondon, kunportas la usonan civilizacion. Ĉu ni rajtas senreage permesi al la usonangla trudi la amerikan vivmanieron : la kulton al dolaro, la ras-diferencigon, la regadon de stultigaj amaskomunikiloj je la soldo de la financaj trustoj, la marginigon de 20 miliono da malriĉuloj? Ĉiu pripensu antaŭ ol rezigni Esperanton!

Artikoloj, kiuj tiom malkongruas kun la esenco de nia movado, ne indus aperi en E-revuo. Sed ia baza principo de **Laŭte** estas akcepti la opiniojn de ĉiuj abonantoj, eĉ se inter ili troviĝas malamiko de Esperanto.

H. Castiau

BORVO metas la demandon : "Ĉu ni rezignu pri Esperanto?" kaj proponas universaligitan angla-usonan lingvon.

Unuavide tio saĝis al mi sakrilegio kontraŭ Esperanton. Sed tamen post pripenso mi kredas, ke la rubriko "Ĉies voĉo" devus esti malferma al ĉiuj ideoj, eĉ la plej malplaĉaj.

Kompreneble, ĉiuj el ni konscias pri la graveco de la angla lingvo sur la kampo de internacia ekonomio, kaj tiu ĉi fakto meritas atenton... sed ne pravigas la proponon de BORVO.

Li trovos respondon en la sama **Laŭte** sub la plumo de J. DEKER, kiu skribas : "estas milionoj da eksterlandanoj kiuj scipovas legi sed ne paroli la anglan ; al ili necesas 5 aŭ 10 jaroj da restado en anglalingva lando por esti komprenata parole."

Jes, estas afero tute bone konata, ke la malfacilaĵoj de la angla kuŝas nek en la vorttrezoro nek en la gramatiko sed precipe en la fonetiko.

Mi konsilas al BORVO legi la bonan libreton de Henri MASSON : "Esperanto aŭ la angla?", aŭ aŭskulti la spritan kasedon de Doktoro John WELLS : "Kial ne la angla?"

La Bazika Engliŝo fiaskis kaj mi dubas, ke nova provo sukcesos, pro la malfacilaĵoj de la prononco. Tiu prapeko de la angla estas la kaŭzo de kripligita lingvo en HONGKONKO (piĝino), en Sud-Okcidenta Usono kaj Florido (ĉikana), sudafrikaj landoj (sŭahilangla), ktp... Kaj ni ne parolu pri la slango tre malsimila de unu lando al la alia kaj kiu fuŝas iom post iom la "normalan" ĉiutagan lingvon.

Mi estas tre scivolema pri la maniero de BORVO por universaligi la anglan, sed mi kredas, ke la ĉefaj oporantoj al tiu kripligo estos la anglaparolantoj mem. "Ektuŝi unu el la plej bagatelaj detaloj de la nacia lingvo saĝnas al la plimultaj neelportebla sakrilegio" skribis G. WARINGHIEN en "1887 kaj la sekvo".

Resume, tiu ĉi rebato al la ideo de BORVO meritis pli grandan malvolvon, sed mi ne estas fakulo pri lingvistiko. Mi provis dum kvin jaroj lerni la anglan kaj mi baraktis precipe kontraŭ la anglan fonetikon. Nun post longa kaj streĉa laboro mi kapablas nur legi sed ne paroli. Do mi nun demandas :

"Ĉu mi rezignu pri la angla?"

Jean CALAMY

P.S.

Unue : Kiu estas ĝuste la nomo de la subskribinto : BORVO?... aŭ ("lapsus calami") KORVO, t.e. birdo de malbona aŭguro?

Due : Ĉu mi falis en kaptilon? La propono de BORVO ŝajnas al mi tiel stranga, ke mi suspektas en ĝi ian ŝercon...

VIROJ kaj VIRINOJ

Antaŭ nelonge aperis sur la paĝoj de L! artikoleto de mia aŭtoreco titolita **Rolo de l' virinaro.**

En tiu skribaĵo mi ne esprimis, ke viro superas virinon aŭ inverse. En ĝi mi diris, simple, ke virseksuloj kaj inekseksuloj devas plenumi ĉiu el ili malsamajn, kvankam gravegajn rolojn, kiujn Naturo postulas de ili.

Kaŭze de tiu artikoleto almenaŭ du laŭtulinoj "koleretis" kontraŭ mi. Sed kial? Mi ne komprenas.

Mi venis en la mondon iun 12an de oktobro je la 3a horo ptm. antaŭ sufiĉe da jaroj.

Kiam mi komencis havi konscion, mi konstatis, ke mi havas du testikojn kaj unu penison kaj pro tio la socio postulis de mi determinitan konduton ; aldone, Naturo, ankaŭ pro tio, metis en mian psikologion specialan agad- kaj pensmanieron.

Aliloke, je la sama dato kaj horo aperis en la mondo bebino. Kiam ŝi komencis havi konscion, ŝi konstatis, ke en ŝia korpo estas iu ekstra truo kaj pro tio la socio postulis de ŝi determinitan konduton ; aldone, Naturo starigis en ŝia psikologio specialan agad- kaj pensmanieron.

Ĉio, kio estas en la mondo, ĉu bona ĉu malbona, estas verko de l' viraro. La rado, kompasoj, papero, presejo, libro, kondomo, stebilo, aŭtomobilo, vaporŝipo, flugmaŝino, radio, televizio, komputoro kaj tiel plu. Verko de l' virinaro estis (estas kaj estos) naski, flegi kaj eduki tiujn virojn, kiuj kreis (kreas kaj kreos) ĉion supre menciitan (kaj ne menciitan : tial tiu "kaj tiel plu").

Aksiomo : Virino povas stiri aŭtomobilon, flugmaŝinon, k.c. pli bone ol viro, sed la inventisto de aŭtomobilo, flugmaŝino k.c. estis la viro.

A. Lopez Luna.

Al Ergoto de Bonaero
Flugu dankesprim' en sincero.

S.B.

Patriko : ĴETU LA UNUAN ŜTONON...

Priue pri reformo de Eo, oni povas sugesti kelkajn modifetojn krom la ĉapelitaj konsonantoj pri la pluralo, la akuzativo, la radikoj kaj vortfarado kaj ankaŭ pri la konjugacio.

Unue, la plurala kaj akuzativa formoj tute povas uzati nur kiam bezonate :

mi manĝis la bona fiŝoj (piskoj?)
mi manĝis la bonaj (kaj ne la malbonaj)
mi manĝis laj (ilin)
la fiŝoj manĝis min

Pri la vortfarado :

akto/i, aktoro/i, akciono/i, aktiva/i, aktibla/i ktp...
fakto/i, faktoro/i, ...
sedukto/i, ...
kondukto/i, ...
lekto/i, lekturo/i, lektoro/i, lektiono/i, ...

Pri la konjugo/konjugationo :

mi amas (j'aime), mi amintas (j'ai aimé), ktp...
mi ames (j'aimais), mi amintes (j'avais aimé)
mi amis (j'aimai), mi amintis (j'eus aimé)
mi amos (j'aimerais), mi amintos (j'aurais aimé)
mi amus (j'aimerais), mi amintus (j'aurais aimé)
mi amu (que j'aime), mi amintu (que j'aie aimé)

Krome, se oni dekretu ke la akcento ciam falu sur la antaŭlastan silabon de la radikoj aŭ sur la sufikson, kio estus normale, oni tiam povus anstataŭigi/substitui j per i , kaj ĵ per j, ekz. :


mi sudjestas pli sana mandjajoi
oni mandju la pli sanai

En konkluziono, oni ne misjudju mia intentionoj, mi nur intentis adjuti (helpi) e (kaj) kontribui facilizi la internationalizo de nia lingvo, tcar se la (dji) volas imponisi kiel internationala komunikilo au mondiala instrumento de komunikationo, tiu nepre devas posesi (posesiono/posesiva...) ties kalitatoj, tcar ne? Eo, samkiel l' alia lingvoj estas interdependa/anta, dji evoluas (evoluo/tiono/tiva...) laŭ l' evoluo de l' alia lingvoj, ja temas pri alternativo (alterni /alternanso /alternationo /alternatoro /alternativa...)

-tcar oni sekcu ne plu evolui kaj ricevi/recepti (receptiono/receptiva/receptionisto...) alies influoj/ansoj, kio tciel imposiblas...

-tcar oni sekcu akompani e kontroli tiu evolutiono al pli da internacialetso, naturaletso, toleretso/anso ktp...

Mi apartenas al neniu sekto (sekti/sektoro/sektiono...), mi desideris (deziris) nur pertinenti e se posible utili.



DENOVE KAJ DEFINITIVE (?) PRI LA ĈAPELITAJ LITEROJ

La ĉapelo sur literoj en esperanta alfabeto estas tre franca influo kiu ĉiam estigis problemojn. Hodiaŭ temas pri perkomputora uzo de Eo kiu ne akceptas ĉapelojn super konsonoj (= konsonantaj). Multaj solvoj jam estis proponataj kiuj ne renkontis ĉies konsenton.

Unue oni povas ne ŝanĝi Eon kaj ja ŝanĝi la tutan komputoraĵon kaj ties aĉajn "soft- kaj hard-varojn"... Kompreneble, tio estus multekosta kaj la konfrontado ne favorus Eon.

Oni sugestis uzadi la h sed tio kontraŭas la fundamentan regulon: unu litero - unu prononcado, kaj estigas konfuzon pri aglutinado de radikoj, neprigante uzadon de streketoj...

Oni ankaŭ proponis anstataŭigi la ĉapelitajn literojn per aliaj neuzataj en Eo t. e. q, w, x, y.

Sed la w ne estas uzebla por anstataŭi konsonon, do nur restus 3 literoj por 6 ĉapelitaĉoj... Krome, tiu solvo ne nur estas malglobala sed ankaŭ malbelega :

- y = ĝ aŭ j
- x = ŝ aŭ ĥ
- q = ĉ aŭ ĥ
- w = ŭ

Cetere, tio kreskigus la nombron de literoj en Ea alfabeto kiuj laŭ mi jam troas...

Nur restas do la pragmatika metodo :

Unue rimarkindas ke en Eo estas redundeco :

- c = ts
- ĝ = dĵ
- ĉ = tŝ

Due, ankaŭ estas tre rare uzataj literoj, ĉu pro arkaikeco (arĥaikeco), ĉu pro simileco kun aliaj sonoj (ĵ).

Nu do, se anstataŭigi ĥ per k kiel jam faritas pri multaj vortoj, ekz. arkaiko, anarkio ... sed plue eble : koruso (ĥoro) kaj ekoo (eĥo) ktp... nur restas sonoj ne skribeblaj sen ĉapelitaj literoj t. e. la sonoj ŝ kaj ĵ.

Kaj ni ĵus vidis ke la litero c (naĉapelita) redundas, do disponeblas por alia sono ekz. ŝ (kiu cetere povus en multaj radikoj similiĝi al ĉ (ĉevalo-tŝevalo-ŝevalo)).

La lasta litero fakte ne raras sed aperas ĉiam en samaj malmultaj vortoj, temas pri la ĵ. Ĝi estas malmulte uzata ĉar ĝi ege similas al alia sono j. Vidu ekz. dĵi kaj dĵi...Kaj la sono j similas al i, ekz. paviliono-paviljono...

Ĉio tio ankaŭ konsistigas redundecon.

Mi do proponas ke oni forigu la ĉapelitaĉojn malmodernajn kaj samfare simpligu la alfabeton malkreskigante ĝian literonombrojn anstataŭ ol kreskigi ĝin :

- c ⇒ ts
- ĉ ⇒ tc aŭ c (cevalo)
- ĝ ⇒ dj
- ĥ ⇒ k
- j ⇒ j aŭ i aŭ ĭ
- ĵ ⇒ j aŭ dj (djurnalo el la latina: diurnus)
- ŝ ⇒ c
- ŭ ⇒ ŭ aŭ ŭ

Ekz. : ĉiuj eĥe ŝercis pri ŝia aĝo en ĵurnaloj

iĝus : tciuj ekoe certsis pri cia adĵo en djurnaloj

Kaj se tiu solvo ne plaĉas, oni ĉiam povas skribi cirilike :

чиной эхе шерцьк при шия аджо эн джурналой.

PTIĈKI NAVERCH (birdetoj supren) :

Plue pri reformo de E-o

Oni jam provis enkonduki en E-on uzadon de iŝi por virinoj anstataŭ ili, laŭ la regulo ke vira formo valoras por ambaŭ seksoj. Rimarku, ke iŝi taŭgas nur se temas pri aro de virinoj... Kiam temas pri unuopo, nepre estu seksa aparteno, sed kiam pri aro de homoj (kiu ne estu homaro, nek humanitato...), tiam ĝenerale, se oni ne seksismu, estas individuoj el ambaŭ seksoj, do tute ne utilas reliefigi la seksan apartenon de la grupo kaj ties aranoj... Tamen kiam pri nur virinoj, tiam oni povas postuli specifan pronomon, kaj je tiu punkto, oni profitu la okazon por proponi reformon de la pronomoj kaj oni havigu :

Mi	Ni	} plurale
Ti/Ci/Vi	Vi	
Li : vire	Zi	
Ŝi : ine	Ĵi	
Si : reflexive	Ĝi	
Ĉi : neŭtrale	Ĝi	

Se tiel, oni anstataŭigu Ti- kaj Ĉi- per ES- kaj TUT- aŭ TOT- Ekz.:

Kiu	- Esu	- Tutu / totu
Kiam	- Esam	- Tutam / totam
Kies	- Eses	- Tutes / totes
Kiel	- Esel	- Tutel / totel
Kial	- Esal	- Tutal / total
Kio	- Eso	- Tuto / toto
Kiom	- Esom	- Tutom / totom
Kie	- Ese	- Tute / tote
Kia	- Esa	- Tuta / tota

Kiuj neniam frenezis, Esuj ĵetu al mi unuan ŝtonon...

Oni ankaŭ subtile sugestis enkondukon de nova afikso iĉo (aŭ uĉo), flanke de INO (tio pro seks-egaleco...). Tiel oni povus diri : iĉoj kaj inoj anstataŭ viroj kaj virinoj, kaj plue : boviĉo kaj bovino, dum bovo estu unuopa formo por plurala gebovoj, kiu iĝu tutsimple : bovoj...

Tiu sugesto "pertinas" (sagacas) sed domage ke en la franca "pino" estas iĉa sekso dum "piĉo" en E-o estas ina... Oni ne povas havigi al si la tuton samtempe!

KONTRASTO

Evangelio laŭ Luko, 8a ĉapitro, versetoj 1 ĝis 3

Kaj post ne longe, li (Jesuo) voĵradis tra urboj kaj vilaĝoj, predikante kaj alportante la evangelion de la regno de Dio, kaj kun li la dek du, kaj iuj virinoj, kiuj estis resanigitaj je malbonaj spiritoj kaj malsanoj : Maria, kiu estis nomata Magdalena, el kiu eliris sep demonoj, kaj Joana, edzino de Ĥuzas, la ĉambelano de Herodo, kaj Susana, kaj multaj aliaj, kiuj faris al ili servadon per sia haveco.

Korano, 4a surao (la virinoj), verseto 35

La viroj respondos pri la virinoj, ĉar Allah distingas iujn disde la aliaj, kaj ĉar la viroj disdonas por la virinoj el siaj propraĵoj. Do virtaj virinoj estas la obeemaj kaj tiuj, kiuj ne malkaŝas la sekretojn de siaj edzoj, per la helpo de Allah ; tiujn, pri kiuj vi supozas, ke ili malobeos, vi admunu, lasu ilin solaj en la lito kaj batu ilin. Se ili tiam obeos al vi, ne persistu en la persekuto ; vere Allah estas eminenta, grandega.

Evangelio laŭ Johano, 8a ĉapitro, versetoj 3 ĝis 11

La skribistoj kaj Fariseoj alkondukis virinon, kaptitan en adulto ; kaj stariginte ŝin en la mezo, ili diris al li (Jesuo): **Majstro**, ĉi tiu virino estas kaptita adultante, en la faro mem. En la leĝo Moseo ordonis al ni tiajn ŝtonmortigi ; sed kion vi diras ? Kaj tion ili diris, provante lin, por povi lin akuzi pri io. Sed Jesuo sin klinis kaj per fingro skribis sur la tero. Kiam ili ankoraŭ demandis lin, li levigis, kaj diris al ili : Kiu el vi estas senpeka, tiu unua ĵetu sur ŝin ŝtonon. Kaj denove li sin klinis kaj skribis sur la tero. Sed aŭdinte tion, ili eliris unu post alia, komencante de la plej maljunaj kaj ĝis la lastaj ; kaj restis Jesuo sola, kaj la virino staranta en la mezo. Kaj Jesuo levigis, kaj diris al ŝi : Virino, kie ili estas ? Ĉu neniu vin kondamnis ? Kaj ŝi diris : Neniu, Sinjoro. Jesuo diris al ŝi : Ankaŭ mi vin ne kondamnas ; iru, kaj de nun ne plu peku.

Korano, 24a surao (La lumo), verseto 3

Adultulon kaj adultulinon vi skurgu cent fojojn, kaj ne lasu kompaton malhelpi vin kontraŭ la leĝo de Allah, se vi kredas je Allah kaj al la vivo venonta ; iuj kredantoj ĉestu al la puno.

Nota : Mohamedo efektive havis multajn edzinojn. Unu el ili, Ajsa, aĝis 6 jarojn ĉe sia edziniĝo, kaj 9 jarojn ĉe sia malvirgiĝo. Malgraŭ la multeco de siaj edzinoj, Mohamedo havis neniun vivkapablan filon. **J. Lépeix**

MI ESTAS NEK ATEISTO, NEK TEISTO, SED SIMPLA KANO

Leginte resumon de la unua libro de la Malnova Testamento, mi konscias pri mia kaneco. Jes, mi estas kano la plej malforta en la mondo, kiun eĉ la plej malgranda kuleto kapablas kurbigi. Tial du aferetoj el la resumo de la libro Genezo ŝokis min. Komprenindas, ke la malforteco de mia persono submetas min al ĉiaj skuetoj. Mi rakontu do! Faru mi eltiraĵon el la resumo : "Dio kreis la homan paron, donis al ili libervolon, kaj postulis ilian obeadon. Li avertis ilin : "Se vi malobeos, vi mortos". Ili malobeis, kaj la tuta homaro poste malobeis kaj tial devas morti..." La du aferetoj, kiuj ŝokis min, estas : la morto kaj la malobeado. Mi ne intencas/volas paroli pri la libervolo, kiu neniel povas iri kun la postulado de obeado.

Morto

"Se vi malobeos, vi mortos". Ĉu la morto estas la puno, per kiu Dio timigis la unuajn homojn? Ĉu la morto estis tiam bone konata de la unua homparo? Ĉu antaŭe iu aŭ io mortis, por ke la unuaj homoj havu ideon pri la morto? Mi dubas pri tiu aserto de la Biblio.

- Se iu aŭ io jam mortus antaŭ la unuaj homoj, kio montrus la timigan karakteron de la morto, ĉu tiu iu aŭ io malobeis Dion? Se jes, ĉu la ordono de Dio estas retroaktiva? Aŭ ĉu Dio kreis la morton kun la mondo? Se jes tiakaze, kial do Dio uzus la timigecon de la morto por sklavigi la homojn al si?

- Se la fenomeno "morto" eniras la mondon per la malobeado de la unua homparo, kiel Dio povis demonstri al ili la timigan karakteron de la morto? Plantoj mortas, ankaŭ bestoj kaj ŝtonoj : ĉu ankaŭ tiuj malobeas Dion? Aŭ ĉu ankaŭ ilin frapas la puno pro

la malobeado de la unua homparo? Kiom aminda kaj amema estas Dio por ne povi diferencigi kulpintojn de piuloj?

Malobeado de la unuaj homoj

Mia kaneco ĉiam stultigas min, kaj mi aparte fieras pri tio. Mi ĉiam deziras pardoni ĉiun, kiu iel eĉ ofendegas min. Mi neniel povas puni, eĉ riproĉi iun, kiu laŭ mia vivokoncepto eraras. Kial do mi iru ĝis eĉ naskiĝontoj? Tion nia ĉion pardonema Dio faras, ĉar li punas la idojn ĝis la kvara generacio pro la pekoj de la gepatroj. La unua homparo malobeis, kaj la tuta homaro pagas la konsekvencojn, ili mortas.

Ĉu vere la morto estas la puno pro la malobeado de unuaj homoj? Mi scias, ke diuloj kompetentas pri tiaj rebatoj. Mi petas, ke ili helpu al mi ekskaniĝi.

Del'feno TIETTI.

Ĉe THIONVILLE (Orienta Francio)

KVARNIVELA STAĜO DE PAROLATA ESPERANTO

Kultura E-Federacio de Orienta Francio proponas praktikan staĝon de parolata Esperanto je kvar niveloj, sabaton la 3an kaj dimanĉon, la 4an de oktobro, en HETTANGE-GRANDE ĉe THIONVILLE (F 57).

Pro sia escepta geografia situo en "lando de la tri limoj" HETTANGE certe instigos multajn esperantistojn de la ĉe-landoj partopreni en renkontiĝo internacia.

Tiel en kelkaj horoj estas eble turismi en la tri landoj: Francio, Luksemburgio, Germanio.

Por la malstreĉo, sabaton vespere, la virtuojoj de la Rulsketila Klubo de Hettange (du premioj okaze de la nacia ĉampionkonkurso en 1990) prezentos belan elmontrandon de sia talento.

Petu informojn kaj aliĝilon al:
Sinjorino GALLEG0 Catherine, 49 rue Général De Gaulle
F 57330 HETTANGE GRANDE.

Bruno HENRY

Jurpraktiko en Aŭstralio

Kvar aspektojn de ĝi mi ŝatas enlumigi.

1^a. Ĝi sekvas la britan originon en tioj, ke laŭleĝe akuzito estas konsiderata kiel kulpa ne antaŭ ol ŝi/li estas kondamnita de tribunalo, kaj ke la tribunalo povas konsisti el juĝisto(j) aŭ el juĝisto (kiu decidas pri la kvanto da puno) kun verdiktanta juĝantaro, kiu lasta konsistas el nefakuloj pri juro, elektitaj el ĉiuspecaj homoj. Ofte oni rajtas elekti ĉu esti juĝata de juĝisto aŭ de juĝantaro.

2^a. Kiel en ĉiuj aliaj landoj, ĝi estas favora al, kaj kelkfoje ilo de, la reganta klaso. Tio aperas en diversaj manieroj kaj pro diversaj kaŭzoj. La juĝistoj, kiuj ja ĉiam decidas pri la severeco de la puno, ĝenerale originas en pli monhava aŭ potenca tavolo de la popolo; do ilia juĝmaniero estas influata de la ideologio de ilia klaso, kiu ideologio ĉiam juĝas altklasanojn pli valoraj kaj malpli kulpaj ol malaltklasanoj. Pluraj altaj juĝistoj krome havas fortajn interesojn financajn en asekuraj kaj komercaj kompanioj. Alia kaŭzo estas, ke ju pli da mono akuzito havas des pli bonajn advokatojn ŝi/li povas dungi; do kulpecgrado kaj eĉ kulpeco dependas de la mono. Ke en Aŭstralio la juro estas klasjuro, oni povas konstati ĉiun tagon. Ekzemploj estas juĝistaĵoj kiaj "ci estas nur instruisto kaj la alia atestanto estas universitatdirektoro, do mi akceptas la ateston de ĉilasta" (en la fama "Orr-kazo"), "seksperforti prostituatinon estas malpli kulpa ol aliajn virinojn" (en ĵusa verdikto pri virinmurdinto), "li havas gravan pozicion en la socio kaj severa puno estus malbona por lia familio kaj "socia ĉirkaŭaĵo", "puni lin per la normala malpermeso de veturigado signifus malavantaĵon por lia komerco" (ĉe kazo de ebria peraŭtomobila mortiĝiginto). Aliaj ekzemploj de socie influitaj verdiktoj: juna viro ricevas karcerpunon ĉar en restoracio li daŭre rigardis al juna fraŭlino kuna kun siaj riĉetaj gepatroj (en urbo Geelong); malgrandsekta pastro kondamnatas al malpermeso loĝi en aŭstralicentra urbeto Alice Springs, ĉar liaj predikoj malkvietigus la idearon de la tieaj loĝantoj.

3^a. Oni ne rajtas malobei juĝistojn se ili oficiale eraras: la juĝoj estas sanktaj kaj neniam maljustaj, kaj la registaroj

oficiale akceptas la verdiktojn. Sed ne malofte okazas ke persono estas juĝata kulpa en "malalta" tribunalo kaj poste malkulpa en pli "alta" tribunalo (kaj inverse), do unu el la tribunaloj devas malpravi, kaj esti punata pro tio. Sed erarinta juĝisto neniam estas konsiderata respondeca pri sia (ofte kaŭzgrava) misjuĝo.

4^a. Laŭtradicie la punsevero devas rilati, analogi, al la krimsevero. Tiu tradicio estas komplete malobeata de la ĝenerala juĝistaro. Ekzemple oni principe ne povas esti punata A) por la fakto ke la suferinto "sentas" la krimon pli akre ol alia suferinto, nek B) pli severe ol alia persono kriminta en samaj cirkonstancoj, nek C) por siaj karaktero kaj filozofio, nek Ĉ) dufoje por la sama krimo, nek D) por krimo ata de alia persono. Tamen en Aŭstralio tio ofte okazas, pro la "homa" malobjektiveco de juĝistoj aŭ pro ilia malinteligenteco: A) Ofte la punsevero estas pli granda se la suferanto suferas pli ol en normala kazo, ne pro la speco de krimo mem sed pro personaj cirkonstancoj (da kiuj ekzistas multaj diversaj, ekz. socia pozicio, malsaneco, aĝo, samfamilianoj, invalideco). B) Tre ofte la punoj estas malsamaj laŭ severo, en similaj kazoj, pro la tute malsamaj rezon- kaj juĝmanieroj de la diversaj juĝistoj, aŭ pro la diversaj sociaj specoj de homoj, ekz. la mortigo ante policanon aŭ politikiston estas konsiderata, kaj punata, pli grava ol ante "ordinarajn" homojn. C) La de la juĝisto fiksita longeco de enkarceriĝo estas ĝenerale mallongigita poste (en si mem jam nelogika kaj kontraŭjureca ago), meze per la duono. La krimulo tamen restos pli, kelkfoje multe pli, longe en la karcero se la karceroficistoj juĝas lin/sin malbone kondukanta. Li/si do estas punata pro karaktero aŭ vivkoncepto. Ĉ) Ofte juĝistoj punas pli severe krimon se la kriminto jam krimis antaŭe: ŝi/li do estas ree punata (= dufoje) por sia antaŭa krimo. D) Ofte juĝisto donas pli severan punon por averti kaj timigi eventualajn postajn plenumontojn de simila krimo: oni do ricevas punon (la ekstraĵon) nur por eventualaj krimoj de aliaj personoj.

Konsekvence ne estas strange ke mi sentos min tute ne sendanĝera, en ĉi tiu mia "nova" lando Aŭstralio (post elmigrado el Nederlando en 1952), se iam mi aŭ miaj samfamilianoj aŭ amikoj alvenos, kulpaj aŭ iomete kulpaj aŭ nekulpaj, en la manaĉojn de la nefidinda juĝistaro aŭstralia.

Marcelo Leereveld.



VORTOJ DE MALJUNULO

— — —
valo
— — —

El memoroj de veterano Niaj du B

BANNIER kaj BARTELMES, pioniroj kaj veteranoj, estis du pilieroj, kvazaŭ kariatidoj, kiuj portis sur siaj ŝultroj la administradon kaj la financon de SAT dum multaj jaroj inter kiuj kelkaj aparte malfacilaj.

Dum tiu longa tempo ili prizorgadis la redaktadon de la asociaj organoj kaj eldonadon de gravaj libroj kaj de la majstroverko de Varengjen, la monumenta PIV, kiu estas ŝatata de la esperantistoj en la tuta mondo.

Unu kaj la alia havis intelektajn fakultojn kaj kulturon, per kiuj ili povis ambicii pli altajn kaj profitdonajn karierojn. Unu kaj la alia elektis malriĉan sengloran ekzistadon tute dediĉitan al E-o kaj al SAT, en fidela memoro pri la komuna amiko LANTI.

De 1945 ĝis 1965, ĉiufoje kiam miaj profesiaj okupoj kondukis min al Parizo, mi trovis kelkajn minutojn por vizito al la SAT-sidejo. Ĉiufoje mi trovis ilin ambaŭ deĵorantaj diligente kaj efike, tamen ĉiam pretaj por afable akcepti vizitantojn. Ilia konversacio estis ĉiam interesa kaj agrabla. Tiuj vizitoj estis por mi inter la kapturnaj vorticoj de la urbego momentoj de malstreĉo en paca haveno.

Bannier kaj Bartelmes vivis longe, fidelaj ĉe la posteno ĝis elĉerpiĝo de siaj fortoj. Nun la sekvon prenis tria B, nia kamarado BARKOVIĈ, ankaŭ kapabla kaj efika.

BANNIER mortis en 1986.

BARTELMES en 1987.

Ni konservu en niaj memoroj iliajn nomojn: ili estas tiuj de grandaj SAT-anoj kaj bonegaj kamaradoj.

Pri la morto

Saĝulo iam diris : "La morto ne koncernas min : dum mi estas, ĝi ne estas ; kiam ĝi estos, mi jam ne estos."

Efektive la paso de vivo al morto estas sendaŭra momento, kvazaŭ geometria punkto sendimensia. Komprenoble, oni povas per imago plilongigi la vivan linion trans la renkonta punkto, eĉ sen fino. Tion faras la kristanoj kaj multaj aliaj. Laŭ ilia kredo la animo pluvivas post morto de la korpo. Mi kredas (ĉar mi ne povas pruvi), ke la animo estas propraj de la korpo kaj pereas kune kun ĝi. Mi do ne kredas pri postmorta pluvivo.

Tamen mi scias, ke mi pluvivos. Ĉu paradokso? Kontraŭdiro? Mi precizigos mian penson. Mi vivos ne eterne en iu ĉielo aŭ infero, sed kelkan tempon plu sur tiu ĉi planedo : en la kara memoro de miaj geidoj kaj de kelkaj parencoj, amikoj kaj kamaradoj. Inter ili mi kalkulas ankaŭ vin, kara leganto. Kiam siavice forpasos la lasta el tiuj memorantoj, tiam malaperos ankaŭ VALO. Definitive. Ne restos eĉ nomo sur tomo-ŝtono ĉar tombon mi ne havos.

Ĉi tie mi malfermas parentezon. Dum longa tempo mi jam pripensis ĉu donaci mian korpon al medicino. Atinginte la naŭan jardekon - tio estas ekde la okdekunua jaro - mi dubis ĉu tiel maljuna kadavro povus interesi kuracistojn kaj studentojn. Mortis Norbert BARTELMES kaj mi eksciis, ke li donacis sian korpon al medicina fakultato. Tiam mi estis en Montpeliero. Mi informiĝis ĉe la tiea fakultato kaj ricevis konfirmon : la fakultato volonte akceptos mian donacon. Mi tuj faris la necesan formalizaĵon.

Nun ĉio estas en ordo. Mi diras : dank'al Bartelmes. Kara Norberto! Ĝis kaj trans la fino li estis al mi ekzempla. Ĉi tie mi fermas la parentezon.

Do, de mia kadavro dissekcita en anatomia amfiteatro, la pecoj estos bruligitaj, kaj la cindroj dissemataj en la naturo. Neniu spuro. Al mi plaĉas imagi tiun dronon en senlima Nenio.

Kaj se mi erarus? Se pravaj estus la kristanoj (multaj el ili estas pli inteligentaj ol mi), se do mia animo pluvivos en paradizo, aŭ pli probable en infero?

Tiaokaze mi dezirus, ke ĝi ricevu novan korpon, preferinde junan, kun bonaj okuloj : ĉar en infero eĉ pli ol en paradizo oni renkontas versaĵne belajn vizaĝojn kaj belajn korpojn. Ne vidi ilin estus ja domaĝe!

Mi jam anoncis, ke la temo ne estas malgaja. Precipe se oni traktas ĝin bonhumore, epikurane.

Kaj se eble kun pokalo en mano : Je via sano, samideano!

Post la centa

Ni festis la centan numeron de **Laŭte!** Kial? Cent estas ja nombro kiel iu alia en la senfina sekvo de la entjeroj. Ĝi estas "ronda nombro", nur tial ke ni kutime kalkulas la numeradon kun bazo dek : $10 \times 10 = 100$. Se ni kalkulus laŭ bazo dek du, la cifera skribo de tiu nombro estus 84, kaj la skribo 100 respondus al nia 144. Se ni kalkulas laŭ bazo du, kiel en informadiko, la rezulto estas jena :

Bazo dek	Skribo laŭ bazo du
$64 = 2^6$	1.000.000
$+ 32 = 2^5$	100.000
$+ 4 = 2^2$	100
100	1.100.100

Jes, vi ĝuste legis : 1 100 100 estas la cifera skribo de cent laŭ bazo du. Konfesu, ke tio ne estas tre ronda nombro.

Sed ni ĉesu pedante matematikumi. Fakte ni ĉiuj kutimas kalkuli laŭ bazo dek. Do cent, 100, estas ronda nombro, facile memorebla, taŭga kaj oportuna por jubileo.

En j. 1987 ni celebris la centan datrevenon de la naskiĝo de Esperanto. La centjarulo, nun cenkvinjara, estas sana kaj fortika ; ĝi marŝas firme kaj vigle al ducenta datreveno en j. 2087.

Ankaŭ nia centnumera **Laŭte!** fartas sufiĉe bone. Ĝi do daŭrigu firme kaj vigle : 101, 102, 103... 200 ktp.

Kun ĉiujare po ses numeroj, la ducenta estas atingota en j. 2009 (mi ne ĉeestos, ne grave). Tiam la okjaraj gebuboj, kiuj diligente lernas en Saint-Mamert sub gvidado lerta de Sinjorino Gausen, estos 25-jaraj : bela aĝo, riĉa je revoj kaj esperoj.

Tiam en la Muelejo estos instalita moderna presmaŝino, kiu produktos pli grandkvante, kaj **Laŭte!** povos havi pli multajn abonantojn kaj legantojn en la mondo.

Ĉu mi revas? Sed ĉu al maljunulo ne estas permesate
revi kaj esperi pri kaj por venonta generacio?

Vivu de Laŭte! de 101 ĝis kaj trans 200 ! Kaj kiel ni aŭ-
ras en Provenco : kaj longe plu !

Okdek jaroj

En j. 1980 mi verkis mian broŝuron "**Sepdek jaroj sub la
Verda Stelo**". Mi ja rigardis min kiel esperantiston ekde
1910, kiam mi unuafoje aŭdis pri la lingvo internacia, kaj
diris : "Iam nepre mi lernos tiun lingvon".

Fakte mi komencis lerni ĝin en j. 1912, do antaŭ 80 ja-
roj, kaj ankoraŭ ne finis. Ĉu do esperanto estas tiom mal-
facila? Certe ne, sed :

1) Mi scias ne ĉiujn vortojn troveblajn en PIV, nek ĉiujn
subtilaĵojn de la (tro) Plena Gramatiko.

2) Nia lingvo en sia genia strukturo enhavas minon da la-
tentaj ebloj ankoraŭ ne multe esploritajn. Ilin elfosi kaj
ekspluati estas tasko por niaj plej kapablaj verkistoj.

Ekzemple : Antaŭ nelonge, Ergoto de Bonaero proponis
la verbon **alsupri** anstataŭ **supreniri**. Mi trovas tiun inici-
aton feliĉa. **Alsupri** elvokas facilan kaj rapidan iron al su-
pro sur ne tro kruta deklivo. La pli longa kaj peza **supren-
iri** pli respondas al pena irado al supro sur kruta deklivo.

Ĉu pri la inversa movo ni diru **desupri** ? Kial ne ? Oni
iras facile kaj rapide de supro al valo, se la deklivo ne es-
tas tro kruta. Ni povus rezervi la longan kaj pezan **mal-
supreniri** por malfacila moviĝo laŭlonge de vertikala klifo
per ŝnuro aŭ aliaj certaj rimedoj, aŭ por singardema iom-
postioma paŝado sur kruta deklivo, kiam rapida marŝo es-
tus danĝera aŭ eĉ ne ebla. Oni alsupras kaj desupras fa-
cile kaj rapide per telefero, oni supren- kaj malsupreniras
pli malrapide marŝante sur siaj piedoj aŭ rajdante sur mu-
lo, aŭ eĉ en vagono tirata de dentrada lokomotivo sur
monta fervojo.

Rimarko : Supreniri kaj alsupri estas formitaj el pure
esperantaj elementoj. Ni do ne bezonas la neologismojn
ascendi kaj **descendi**. Jen venas la tikla demando pri neo-
logismoj. Ni pritraktos ĝin aliafoje.



"La fragila robo de la legendoj
havas lavendan parfumon..."

la pipro por azenoj

Mi havas la plezuron rakonti al vi provencan legendon :
"**La pipro por azenoj**", kiun maljunulino el mia vilaĝo di-
ris al mi.

Ne forgesu, ke la legendoj vekas ĉe la infanoj koran
inteligenton, vivigas la internan eston kaj indikas la vojon
al la neelsekigebla fonto, kiu lokiĝas en ĉiu el ni. Ili es-
tas fragmentoj el la pasinteco kaj frapas la imagpovon.

Malrapide legu, kun infana koro, tiun ĉi rakonton pri-
semitan de naiveco kaj parfumitan de la plantoj el Pro-
venco, mia mirinda lando. Tiam vi eniros en eksterordi-
naran ĝardenon, kie ĉio iĝas ebla...

Antaŭ kelkaj jarcentoj, en izolita domo sur provenca
kamparo, vivis kun sia avino orfa knabeto nomita Betu-
zeto. La tutan tagon li gardis kaprinaron sur monteto.
Per la lakto lia avino faris ege bongustajn fromaĝetojn
sukcese vendatajn sur foiro.

Iun vesperon, la maljunulino tordis al si piedon.

- "Kiel iri morgaŭ al foiro?" ŝi lamente diris al la nepo.
- "Trankviliĝu, kara avineto, mi mem iros vendi la fro-
maĝojn."
- "Ĉi estas tro juna, mia bonkora Betuzeto!"
- "Ne, tute ne, mi jam estas ok-jaraĝa!"
- "Kaj la vojo ? Ĉu ci kapablos trovi ĝin?"
- "Kompreneble! Ĉi forgesas nian azenon, kiu ĉiusemajne
kondukas cin al la urbeto!"

Pro tiuj valoraj argumentoj la avino konsentis post mil
rekomendoj.

Tiel, je la sunleviĝo, nia Betuzeto, fiere sidanta sur la
azeno, iris al la urba vendejo.

Li ege ŝatis la naturon; gardante la kaprinojn, li havis
la tempon por observi, admiri ĝin. La floroj, la bestoj, la
vento, la ĉielo estis liaj amikoj. Li parolis al ili, li kan-
tis por ili. Do, sen miro, li rimarkis, ke la verdaj pinoj,
kvazaŭ el smeraldo, vokis lin per signoj : "Venu, Betuzeto,
venu ludi kun ni!" Sed la etulo, kiu promesis, ke li ne hal-

tos survoje, respondis nur per saluto. Li kontentiĝis sate ĝuante la pejzaĝon. Ĝi estis rido en kuno : ridis la tero, ridis la floroj kaj la suno, kies karesoj estis granda plezuro. La velureco de la aero cirkuligis inter la arboj kaj la ŝtonoj entuziasmajn mesaĝojn. Blue helis la ĉielkupolo kaj lummantelo kovris la kamparon.

Malfeliĉe, post momento, Betuzeto forgesis la avinajn rekomendojn, ekvidante asfodelojn. Rapide li saltis teren kaj kuris al la floroj, diafane blankaj.

- "Asfodelo, asfodel' de mia kor', via nomo sonas klare kiel kristalo..." Tiam, tiu okjaraĝa knabeto surgenuiĝis en la lumo ; forgesante la glitadon de la horoj, li adreme rigardis siajn amikinojn kaj donis al ili mil kisojn, kiuj ekflirtis kiel veluraj floketoj.

Estis la krioj de la azeno, kiuj vekis lin.

- "Mia Dio! La fromaĝoj!"

Fulme li kuris, kaj rapide, tro rapide, grimpis sur l'azeton kaj faligis la fromaĝojn en la polvon. Antaŭ tia spektaklo Betuzeto eksingultis ; li komencis malesperi kiam la bona azeno diris (ne forgesu, ke en tiu tempo la bestoj parolis) :

- "Ĉesu plori, amiko mia! Kolektu la fromaĝojn kaj sekvu min."

Kaj ĝi kondukis la knabeton sur lokon, kie kreskis etaj, verdaj plantoj.

- "Ĉi tiuj estas pipro por ni azenoj ; ili vere bongustas ; pluku bukedon kaj dispecetigu ĝin sur la fromaĝojn."

Kaj Betuzeto agis laŭ la konsilo. Sed vidante la rezulton, li denove ekploris : - "La fromaĝoj estas ankoraŭ pli malpuraj ol antaŭe!"

- "Bonvolu gustumi kaj ci vidos!" denove parolis la azeno.

Kaj Betuzeto, sen entuziasmo, mordetis fromaĝeton... Ho, mirindaĵo! Kia delico! Nenia polva gusto sed la parfumo de la Provenco...

- "Mirinda bluo de l'ĉielo, mi deziras kun vi dividi mian ĝojon!"

Kaj la ĝojo flugis kiel alaŭdo, alte, tre alte, ĝis roza nubeto. La azeno estis kontenta kaj diris :

- "Al la aĉetontoj nenion diru pri mi, sed parolu pri ekzemple... feina sekreto. Jes, feina sekreto, tio estas bona ideo."

- "Konsentite", respondis Betuzeto.

Du horojn poste, ili estis alvenintaj sur la foira placo.

Kun espero la knabeto ekkriis :

- "Jen bongustaj fromaĝetoj! Venu, venu, ne hezitu!"

Kelkaj virinoj alproksimiĝis, rigardis kaj moke rimarkigis :

- "Ĉu ci trovis la fromaĝojn en rubujo, aŭ sur sterko?"

- "Ne, tute ne, sinjorinoj ; ili estis preparitaj laŭ feina recepto. Prenu unu da ili kaj gustumu ĝin."

- "Komence lavu ĝin" kaj ili foriris, ridegante...

Ili foriris, escepte de tri, la plej scivolemaj.

- "Ĉu vere estas feina recepto?"

- "Jes, vi bone aŭdis, temas pri recepto de feinoj, kies manoj estas kvazaŭ du libeloj, kies tuniko estas teksita de lunradioj ; la feinoj estas tiel mirinde belaj, ke vidante ilin, oni sin kredas en paradizo ; ili estas tiel afablaj, tiel... Sed pardonu min, mi tro babilas..."

Pro tia entuziasmo la tri virinoj, kun granda fido, gustumis fromaĝon kaj aĉetis... la tuton!

Ekde tiu memorinda tago la fromaĝoj de la avino estis preparitaj laŭ tiu sekreta recepto kaj venditaj kun sukceso.

Nuntempe oni ne plu parolas pri sekreto ; oni ja scias, ke la fromaĝoj de la vaŭkluzo regiono estas parfumitaj per satureo, la pipro por azenoj.

Michèle Freud

Aperis en julio la unua vortaro okcitana-Esperanto!

DICCIONARI DE MILA MOTS

okcitana vortaro de la mil vortoj plej uzataj, kun la traduko en kataluna kaj esperanto, enhavas krome kvar paĝojn titolitajn **Historio kaj situacio de la okcitana lingvo** kun la okcitana tradukaĵo vidalvide. Tiu belega volumo estas 496-paĝa kun kvarkolora bindaĵo kaj multaj desegnoj kaj mapoj. Kun la aŭtoro Jacme TAUPIAC, profesoro pri la okcitana en Tuluzo kaj Montalban, kunlaboris profesoro Xavier Lamuela por la kataluna parto, kaj profesoro Pierre Janton, por la esperanta.

Mendi al : Jacme TAUPIAC, La Piboleta, Sant Marçal, F 82000 MONTALBAN.

1 ekzemplero : 99 FF (+ 18 FF por la afranko)

Rabato por la librovendistoj.

KOMENTOJ PRI: "TRA LA MONDO PER BICIKLO KAJ ESPERANTO"
laŭ Lusjeno A. PERERO (=Lucien A. PERAIRE), SATbs/Laŭte,
110p., 1990^a. Prezo 20 FF.

!MIRIGA MONDVOJAGO!

Jen plaĉa legaĵo kun pli malpli facila E-a lingvouzo de admirinda kaj gratulinda ĝisosta verdulo: Lusjeno A. PERERO! La feliĉa leganto ĝuas lertan, viglan rakontadon de neatenditaj kaj eĉ neverŝajnaj okazaĵoj!!! Oni devas esti tre kuraĝa por alfronti tiom da malfavoraj eventoj kaj la foje malfacilan bicikladon sur ne ĉiam glataj vojoj! Tial des pli konsternite estas legi sur la p.104^a ke post la reveno, je la 2^a labortago, lin trafis akcidento: la dekstra piedo frakasita! Dum 4 jaroj da riskoplena biciklado (ekde julio/1928^a) al li okazis nenio komparebla! Jen la fatalo manifestis sin post lia reveno! Lusjeno naskiĝis je 26-aprilo-1906^a, do, nuntempe li estas 86jara! Li ekbiciklis el Liono (Francio) vizitante jenajn landojn: Germanio, Aŭstrio, Hungario, Pollando, Ukrainio, Rusio, Turkio, (Helpe de speciala aparato, li biciklis eĉ sur la reloj de trans-Siberiaj fervojoj!), Ĉinio, Manĉurio (ĝis Vladivostoko), Japanio denove Ĉinio (Ŝanhajo, Tajvano, ktp.), Hindaĉinio, Kamboĝo, Sumatro... en neforgeseblaj travivaĵoj!

ĝis reven' al sia patrio:
la bela kaj dolĉa Francio!

Kaj ĉie li renkontis helpemajn Esperantistojn!!! Jen ekzemple: la Aŭtomobila Klubo de Vladivostoko, je 20-JULIO-1930^a, organizis paradon (filmitan!) dum kiu oni prezentis PEREROn al la publiko, kaj ĵurnalistoj diskonigis ke li estas la 1^a viro, kiu transiris bicikle de Atlantika al Pacifika oceanoj, sen oficiala helpo, nur dank' al solidareco kaj helpo de E-istoj!

Tia mond-veturado nerefuteble demontras la internacian econ de Esperanto!

La verkon preskaŭ perfekte kontrolis pluraj amikoj de revuo LAŬTE! Mi diras 'preskaŭ perfekte' ĉar tre be daŭrinde, kelkaj malglataĵoj k Esperantalaj vortoj enŝteliĝis! Espereble, oni forigos ilin en estontaj eldonoj, ĉar ĉi tiu bonega libro meritas konstantan reeldonon; tial ke temas pri aŭtentika dokumento de travivi-

taj aventuroj en Esperantujo, kaj atesto pri eksteresia Esperantisto!

Bonvenus pli da E-igitaj propraj kaj geografiaj nomoj! Foje ili aperas E-igitaj, foje, ne!

Esperantalo aŭ malĝuste	Esperanto aŭ ĝuste
7,21;39,17;40,-17 inĉendjo	BRULEGO
11,-8 Se kompari	Se oni komparas
	(Tarzaneska parolo: Se Tarzano veni, Ĵana ne sveni!)
21,-6 loki (esti en loko)	LOKIGI (meti en lokon!)
	(PIVa eraro!)
30,15;31,6 far = BLEK!	FARE DE (Tamen ĝuste ĉe:47,3; 96,2! Misuzata prepozicie ĝi egalas al BLEK!!)
	Ekzemple: Poemaro verkita BLEK Ajnulo!)
50,-6 sgetejo	GLITEJO
51,-5 de "Far West"	de Fora Okcidento
	(Ĵial senpage reklami la anglan?!?!)
58,8 sgold(ad)on	admonon/riproĉon
64,1 septoj (anat.)	vandoj
70,-3 ĥita (poezivorto)	MALBELEGA/AĈEGA/AĈA
71,-16 baleto (=eta balo)	BALEDO
76,15 buddista	BUDHISTA
77,-8(k alie) esperanto	Esperanto (majuskle!)
78,-2 Ŝanhaj	ŜANHAJO (En PIVo!!!)
	(Tamen ĝuste sur 83,-3! -Nekonsekvenco uzado!)
83,-13 firda	MALVARMA
85,-1 ĥita	aĉa
86,18 neneadebla	NENEGBLA
	(strangaĉa kunmetaĵo!)
86,-6 nodzas	OFENDAS (la francan presti-
88,-11 riz-pirkladon	rizotransplantadon
95,-16 "western"	vakerfilmoj
96,5 gvori	manĝegi, glut(eg)i
103,2 emocio min dringas	emocio min (KOR)PREMAS
97,11 Kamboĝio	Kamboĝo (En PIVo!)

Mankoj en la KOREKTENDOJ

51,13 horoj 81,14 la regiono/Holivudo 83,-1 sen paroli
85,-6 estis 90,-14 (ne: ankoraŭ pli, sed:) eĉ pli 90,-7,
-10,-14 (ne: betlo, sed:) BETELO! (laŭ PIVo!) BETELfolio,
BETELruĝa salivo 93,7 firmaoj (Ja ne samas: FIRMA
agento k FIRMAA agento!) 93,-15 fariseeco 93,-13 blind
umitaj (portempe!) 99,-16 (Ne: AKVANOJN?? Ne-PIVa!, ĉu

eble: SKVAMOJN????!!!

ALIAJ RIMARKOJ: 69,7 Pli trafe: "oni trovas tie...dolmenojn, t.e., kolosajn pli-malpli platajn ŝtonegojn, METITAJN HORIZONTALAJ SUR VERTIKALAJ ne malpli kolosaj ŝtonegoj (=menhiroj).

96,5 La aŭtoro estas "gvorata de moskitoj"!! GVORI: E-ala vorto anst. la ĝusta: MANGĜI!! Tamen, se moskitoj mangĝis lin, li mortis, kio fakte ne okazis! Pli ĝuste, do: MULTE PIKATA DE MOSKITOJ!

KROMKOMENTO: Ĉu ĉiuloke temas fakte pri kuloj, aŭ ietie, pri moskitoj, aŭ pri ambaŭ? Ĉar KULO: france COUSIN, angle GNAT, kastiliane JEJEN; duflugila insekto, malpli grandas ol MOSKITO, sed ĝia piko pli doloras! MOSKITO: france MOUSTIQUE, angle/kastiliane MOSQUITO.

ERGOTO DE BONAERO

Pri "Strangaĉaj landnomoj kaj kromaĵo"

(Vd. L!99, p.33/34)

Sub la titolo "strangaĉaj landnomoj kaj kromaĵo", verkita de Ergoto de Bonaero, trovis mi strangaĉojn en la de li korektitaj nomoj:

1. Brazilo estas la ŝtato; Brazilio la ĉefurbo (vidu PIV-on).
2. Ĉejlono jam de longe ne plu ekzistas, estis la kolonia nomo, nun Sri Lanko.
3. Holando estas nur parto de Nederlando, ekzistas du provincoj nomataj Nord-Holando kaj Sud-Holando. Nederlando nomiĝas en la franca lingvo Les Pays Bas, ĉar efektive ni havas malaltan landon, grandparte sub la marnivelo.
4. Ĉilo havas laŭ PIV tute alian signifon, la lando nomiĝas Ĉilio.
5. Pri Vaskio, dum la lasta SAT-Amikara kongreso la Esperantistoj el tiu regiono mem nomis sin Eŭskoj. En niaj gazetoj mi ofte legis pri E.T.A., la vasta apartiga asocio, do eble ankaŭ Eŭska? Kiel ĉefredaktorino de "La Migranto" ni havis kelkajn miskomprenojn pri geografiaj nomoj, eĉ gravajn. Pro tio ni interkonsentis kaj konsilas al niaj verkantoj, se ni ne trovu la Esperantan nomon en PIV, ili uzu la skribnomojn de la geografiaj nomoj el la lando mem, do en la nacia lingvo de la koncerna lando.

Antje Noordevier.

UNUA PLANO

Kara Dora,

La televidilon ĵus elsaltinte, mi impetas al la skribotablo, ne nur ĉar mi volas en la tujo plenumi la faritan de mi promeson, sed ĉar el la tuta koro mi deziras, ke la travivitan antaŭ momento emocifluon mi sukcesu komuniki al vi kun tia skuopovo, kian spertis mi.

Ho ve! Kial tiu serio "Atestantoj" estas dissendata nur de regiona kanalo? Kial ne posedas mi la necesan materialon por vin profitigi per vidbendo en via fora landangulo, dum plenfervore spontana letero dampas la korvibradon kaj diluas la plej fajrajn kolorojn de vivo-vero?

Nu, longe min obsedos la aperinta vizaĝo de nia Marteno (permesu al mi tiun posesivon), tiu unuaplane vizaĝo la ekranon kvazaŭ transsaltanta; tiu vizaĝo de la gri-zaj fulmetantaj okuloj prilumata, tiu vizaĝo de troaj faltoj trasulkata sed de ridetanta buŝo rejunigata; tiu vizaĝo kun serena, kvankam moviĝema kaj esprimoplena, kiu tiel bone kongruas kun la reakirita varma voĉo - la voĉo, kiu nerezisteble konvinkis tiom da klientoj, kiu nun nerezisteble tiras senpovigitajn sur la vojon de l'reviviĝo.

Des pli trafaj ĉar simplaj sonis la atestovortoj de nia reviviĝinto. Kun la afabla permeso de la kasestro (kiu sincere ĝojas pro la pozitiva vojturniĝo de la martena vivo), estis filmite sur la laborloko mem. De malantaŭ sia impona skribotablo troŝargita de paperamaso, telefonaparatoj kaj fotokopiilo, Marteno elvokis la malrapidan kvankam senmankan defalon pro troa nervostreĉo. Li kuraĝis elmontri la platan boteleton funde de ŝlostirkesto iam konstante kuŝintan - tiun boteleton, el kiu li kaŝe drinkis por redoni al si iom da vicleco antaŭ plenumo de taskoj ĉiutage pli pezaj kaj malfacilaj.

Poste la spektantaro eniris la apudan kafejeton, kie li restaĉadis ĝis malfruaĵaj nokthoroj - ĝis la momento, kiam la kafejestro pelis for la fuŝbalbutantan drinkulon.

Ni revenis al la oficejo. Li kuraĝis la antaŭajn gestojn forlasiĝadi en la vasta fotelo, kie li duonkonscie tranoktis dum la lastaj labormomentoj - kiam vi malper-

mesis lian rehejmiĝon, malpermesis renkontiĝojn kun la du filoj viaj, eksigis de li, eĉ petis divorcon. Antaŭ la kamerao Marteno kuraĝis malfermi la ŝranketon, kie li enŝosis siajn razilon kaj vestaĵojn, ridindajn helpilojn, por ke li aspektu pura komence de la labortago, por ke li provu malfruigi la momenton, kiam oni lin eksigos post tro da okazoj, dum lia bildo de alkoholulo ne plu estos respondinta la devigan bildon de vigloplena juna kadrujo.

Kun sobra sincereco li aludis vian eksigon (justan sekvon de jam ne plu tolerebla familiovivo), sed larmoj venis en liajn okulojn, kiam li elvokis la du filojn viajn kaj sian patran miskonduton. Li kuraĝis rememori la vevindan dimanĉon, kiam elirinte duonebria el trinkbutikacio li krucpasis vin trioje sur la strato marŝantaj kaj trioje de li la kapojn flankenturnantajn. Li eĉ klarigis (tamen kun nenia ajn riproĉo en la voĉo), ke pelis lin straten tia finlasta bato.

Ankaŭ en miajn okulojn larmoj venis, kiam Marteno en plena sincereco rakontis, kiamaniere li trampigis, kuŝadis apud varmofaŭko kun ĉemane staranta botelo da vino; kiamaniere li sinkis en malesperon, malestimon al si mem kaj tuta socio; kiamaniere tamen ekskolegino neniam malesperinte ne hontis lin viziti, surtrotuare kunbabili kaj ekrevekis en li ieton da propra estimo pro la fakto, ke ŝi ne ĉesis konduti al li, kiel al vera homestajo. Tion mi raportas, Dora mia, ne ĉar mi fieras pri mi, tute ne; nur por ke vi eksci, ĝis kia grado de sincereco li volis atestaĵojn liveri pri si mem, por enblovi en la animojn de ŝanceliĝantaj alkoholuloj (kaj ties familianoj) firman certecon pri ebla rehomigo - la saman certecon, kiun mi necedeme enblovis en lin.

Sed la sukceson de sia rehomigo li ja ŝuldas ne al mi, sed al la fakulo, kiun la firmaestro de tempo al tempo dungas por savi hejmkadrujojn pro troa nervostreĉo al simila problemo alfrontatajn. Antaŭ tiu fakulo ni kliniĝu! Kaj cetere antaŭ la favorkoreco de la eksdirektoro, kiu ne hezitis pagi parton de la fakulservoj al Marteno. Al ambaŭ ĉi-lastaj volis publike omaĝi kaj tiom da fervoro vibris en lia voĉo, ke ili ne povos pridubi la profundecon de lia dankemo.

Kaj plian fojon, jen sur ekrano la unuaplena vizaĝo, la grizaj lumaj okuloj. Plian fojon sonis la varme-vibre kon-

vinka voĉo. Reviviĝinta Marteno raportis, pri sia nuntaga agado en asocio, kiu prenas sur sin la revivigon de homoj defaligitaj pro superforte streĉigaj postuloj de nia socio. Kaj la okuloj lumadis plu, kaj la voĉo vibradis plu, fine superbruita de la muzikbendo la finon de la elsendo signanta.

Ĉar en plena sincereco mi komencis tiun atestoforman leteron, en plena sincereco mi ĝin konkludas. Antaŭ ne-longe Marteno tre diskrete komprenigis, kiajn sentojn li flegas rilate al mi. Post esprimo de mia kortuŝo mi sciigis lin, ke se senlima amikeco min ligas al li, ja ne temas pri sento alispeca.

Tamen kun diskretemo simila al tiu de Marteno, permesu, ke mi aldonu jene: se vi estus vidinta la unuaplanan vizaĝon kun la grizaj lumoplenaj okuloj, ridetanta buŝo, kortuŝaj faltoj kaj hela sereneco, ĉu ne estus enŝteliĝinta en vian koron iom da bedaŭro pro via iama taksado? icm da bedaŭro - eble da konscienciproĉo - koncerne la filojn viajn je reindiĝinta patro senigitajn? eĉ iomete da bedaŭro - kial ne? - koncerne vir, en sol-eco tristigantan? Al mi diru nenion, mi petas vin, ĉar peranto mi ja ne estas, sed pripensu.

Amikajojn de

Via Brigita.

S. BONIOL

(daŭrigo de p.2)

adverboj (agrabla, tre), adjektivo (bona), substantivo (tago), pronomoj (mi, vi, kiu), as-tempo (estas), u-tempo (pardonu). Sed, uzinte tiun dialogon kun komencantoj, mi konstatis, ke ili havis neniun problemon por ĝin kompreni kaj neniun bezonon traduki ĝin nacilingven.

Kial? Ĝuste ĉar la enhavo de la frazoj, la esprimintencoj de la parolantoj, eĉ la tono de la voĉoj, la gestoj, la kunteksto grandparte helpas la komprenon kaj krome instigas la deziron kompreni, vekas la intereson. Frazoj gramatike pli simplaj sed al kiuj mankas signifo, kunteksto, intenco, ne estas pli facile kompreneblaj, male. Tiel, oni povas esti certa, ke eĉ je la unuaj paŝoj dialogo, kiu spegulas veran komunikadon ne nur estas ebla sed eĉ helpas kaj stimulas la komprenon - malgraŭ pli malfacila gramatiko.

Aldonindas cetere ke paroloj uzataj en vera komunik-situacio estos ofte reutiligeblaj kaj spontane reutiligataj de la lernantoj. Mi donos nur la ekzemplon de la vorto : "Pardonu!" kiu troviĝas en la supre menciita dialogo. Tiu vorto estis uzata de la lernantoj kaj en la kurso kaj ekster la kurso kiam ili ne bone komprenis ion, kio ofte okazas kiam oni eklernas.

Tiu spontana reuzo (multajn samajn ekzemplojn oni povus citi) ŝajnas al mi pruvo, ke la proponita lingva materialo respondis al komunik-bezono. Male, ĉu iu havos iam la okazon demandi : "Ĉu seĝo estas meblo?" aŭ "Ĉu kato estas besto?"

Eble oni ĝenerale emas rigardi la gramatikan progreson tro grava kaj pro tio oni elpensas frazojn, kiuj neniel rilatas al vera uzo de la lingvo, eĉ foje ne havas sencon, kiuj sonas strange, artefarite, false.

Kiam male oni prioritare konsideras la esprim-bezonojn en iu difinita situacio, tiam oni havas dialogojn pli verŝajnajn, pli signifo-plenajn, pli aŭtentajn.
(daurigota)

Katrin'

Nota de la red.: Bedaŭrinde, pro lokmanko ne eblas aperigi la tutan artikolon en ununura fojo. La finon vi trovos en la novembro numero. La interesatoj povas (re)legi ankaŭ la ĝeneralajn konsiderojn publikigitajn en L! 100, p.35-36.

TUTPIRENEA E-ĤORO

Pro la sukceso de la ĥoro-staĝoj okazintaj de la 23a de decembro ĝis la 1-a de marto, estas planataj novaj staĝoj :

- de la 21a ĝis la 27a de septembro '92 sub gvidado de Petro de SMET el Belgio
- de la 21a ĝis la 28a de februaro '93

en la sama loko : La Freychède, Montferrier, F 09300 LAVELANET.

Informas plu : JORGOS, F 09120 ST FELIX DE RIEUTORT

Tel : (33) 61-608-683. Venu, venigu kantĉi kun ni. Bonvolu ankaŭ sendi partifurojn. Antaŭdankojn!

la venonta numero aperos fine de novembro

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47470 Beauville. CPPAP 58651